# Hector Hodler: Ŝtatligo dependas de nova pensmaniero

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 marto 05 kaj 07

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo87-07/SRI-1987-07-B-3-1987-03-05-07-Claude-kaj-Andree-GACOND-Hector-Hodler-Shtatligo-dependas-de-nova-pensmaniero.mp3

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND, daŭrigante sian prezentadon de la penso de Hector Hodler, la fondinto de UEA.

Hector Hodler konsciis pri la komplekseco de la pacproblemo. Por li ĝi ne estis morala aŭ ekonomia, sed politika kaj jura. Kaj ankaŭ eduka. Rilate al la eduka aspekto de la pacproblemo ni legas al vi citaĵon el la 18-a ĉapitro de la studo pri la pacproblemo, kiun publikigis la revuo Esperanto de julio 1915 ĝis februaro 1917:

A.-"Flanke de la propagando, kiu celas varbi al la pacideo kiel eble plej multajn homojn, grava estas la edukado, kiu el ili faros fidplenajn agemulojn. Tro ofte okazas, ke homo supraĵe akceptas novajn ideojn, sed ne forlasas la sentojn kaj refleksojn, kiuj devenas de tute kontraŭaj kredoj. Oni ekzemple renkontas liberpensulojn, kiuj estas ekstreme sektemaj, kaj pacifistojn, kiuj tute ne sukcesis sin liberigi je ŝovinismaj antaŭjuĝoj. En tempo de krizo, tiu interna kontraŭeco inter la novaj kaj la malnovaj ideoj eksplodas, kaj plej ofte estas la malnovaj ideoj, kiuj venkas. Estas facile tion konstati nuntempe, kiam antaŭaj pacemuloj rezonas same malsprite, se ne eĉ pli, kiel la plej fervoraj ŝovinistoj. Tio devenas el la fakto, ke la homo estas multe malpli, ol li supozas, libera akcepti novajn ideojn, pro la premado de l' pasinteco. Nur zorga kaj sistema edukado, komencita sufice frue kaj neniam forlasata, povas iom post iom ŝanĝi lian pensmanieron kaj aliigi lian konduton." – fino de la citaĵo.

Cl.- Ne estos la lernejo, kiu zorgos pri tiu edukado al paco, ĉar ĝia horizonto restas limigita al tiu de la propra nacio. Hektor Hodler antaŭvidas, ke la ŝanĝoj estos malrapidaj. Ili dependas de la ekzisto de elito. Ni citas:

A.- "La realigo de tiu grandioza tasko estas ebla nur se ĉiulande troviĝos je la taŭga tempo, elito preta por ĝin entrepreni. Ĉu jam ekzistas la elementoj de tia elito kaj, en jesa okazo, ĉu ilia baldaŭa kunlaborado estas esperebla? - Al tio kompreneble povas respondi nur la faktoj. Sed ŝajnas nedubeble, ke jam nun en ĉiuj landoj homoj ekzistas, kiuj povas kompreni la, cetere tre simplajn, ideojn ĉi tie priskribitajn, kaj estas pretaj labori por ilia triumfo, tuj kiam formiĝos serioza organizaĵo, kiu scios tuŝi ilian spiriton kaj utiligi ilian bonvolon. La unua kondiĉo por ilia kunlaborado kuŝas en tio, ke ili komprenu, ke je la nuntempaj abomenaĵoj estas kulpa super ĉio la anarkia reĝimo, je kies konservado kaj glorigo ĉiuj popoloj partoprenis. Tiellonge kiel oni obstinos diskutadi pri la respektiva respondeco de la individuoj aŭ de la popoloj, nenia pozitiva rezultato estos atingebla. La homoj, kiuj sin dediĉos al la agado por la starigo de nova ordo internacia, devas fari strekon sub la pasintaĵoj kaj komenci sur nova fundamento."

Cl.- Hector Hodler konscias, ke tiu edukado al nova ordo ne devas resti teoria. Tial li proponas, ke oni enpaŝu sur la kampon de la realigoj, kaj li donas ekzemplojn de eblaj agadoj. Ni citas:

A.- "Tiu edukado ne sole estu teoria, sed ankaŭ praktika. Publikigo de broŝuroj kaj edukaj verkoj, aranĝo de kursoj kaj paroladoj ĉe la lokaj centroj, agado per la ĉiutaga ĵurnalaro ne

sufiĉas, kvankam ĉio tio kompreneble neniam estas senutila. Oni ankaŭ devas laŭeble plimultigi la personajn rilatojn inter diverslandanoj, per la aranĝo de studvojaĝoj fremdlanden, per la korespondado, per organizo de internaciaj manifestadoj. Nur dank' al tio iom-post-iom naskiĝos toleremo inter la popoloj kaj estos esperebla la formiĝo de nova pensmaniero, dank' al kiu ŝtatligo estos realigebla. En tiu rilato kelkaj disaj provoj estis faritaj antaŭ la milito, sed ili estis tute nesufiĉaj kaj precipe estis aranĝitaj sendepende unu de la alia, sensisteme kaj sen certa rilato kun la idealo de interpopola unuiĝo."

Cl.- Tiu ĉi ĵusa citaĵo montras, kiel realisma restas Hector Hodler. Li konscias, ke ŝtatligo estos realigebla nur kiam formiĝos nova pensmaniero, kaj ke tiu ĉi dependas fine de la plimultiĝo de la personaj rilatoj inter diverslandanoj. Koncerne la juran transformon de la interŝtata anarkio al ŝtatligo, Hector Hodler neniam forgesos, ke unue devas ŝanĝiĝi niaj ideoj. Jen tiurilate la lastaj frazoj de lia studo pri la pacproblemo:

A.- "La milito, ni ne ĉesu tion rediri, ne estas superhoma fatalaĵo. Ĝin povas malhelpi la homa volo, transformante la sistemon, de kiu ĝi devenas. La ideoj, sur kiuj sin apogas tiu sistemo, ne estas eternaj; same kiel aliaj, ili povos ŝanĝiĝi, se nur stariĝas energia elito en ĉiuj landoj, kun la necedema intenco ŝirmi de nun la homaron kontraŭ la militmonstro. For la pasinto! Ni rigardu antaŭen! Ni unuiĝu kaj agu! La mondo soifas novan idealon.

Cl.- En la hodlera penso la dezirata revolucio antaŭ ĉio dependas de pozitivaj agoj, kiuj estu samtempe plenumataj de ĉiuj klasoj. Ni citas:

A.- "Kiel ni jam atentigis, en la estonta agado oni turnu sin ne sole al la kleruloj aŭ al la reprezentantoj de la altaj sociaj rangoj, sed al ĉiuĵ klasoj."

Cl.- La internacia lingvo en tiu revolucio ne povos esti neglektita. Ni citas:

A.- "Kiam la paca movado ekiros sur tiuj novaj vojoj, ĝi nepre sentos la necesegecon de internacia lingvo, dank' al kiu la pacamikoj ĉesos esti fremduloj unu rilate al la alia. Vane estas paroli pri la alproksimiĝo de la popoloj kaj la formiĝo de internacia spirito, se la homoj de diversaj nacioj, krom malmultaj privilegiuloj, ne estas kapablaj sin reciproke kompreni. La indiferenteco de la paca movado rilate al la celado por internacia lingvo ankaŭ devenas el la erara ideo, ke la starigo de ŝtatligo dependas pli de la bonvolo de 1' juristoj kaj politikistoj, ol de la pensmaniero de la popoloj mem."

Cl.- Aŭdante tiujn ĉi citaĵojn el la konkluda ĉapitro de la studo de Hector Hodler pri la pacproblemo, vi verŝajne notis lian kvazaŭ profetan tonon. La fondinto de UEA fakte alvenis al certecoj, kiujn li provas komprenigi al la legantaro de la revuo Esperanto, kaj tre ofte tio trudas al lia stilo tonon ne tre kutiman. Sed ankaŭ liaj temoj de meditado ne estas kutimaj. En tio la verka stilo de Hector Hodler eksimilas al la pentra stilo de lia patro Ferdinand Hodler: eksterordinara firmeco, kies fundamento estas aŭtonoma penso objektivema.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond parolis pri la penso de Hector Hodler. Ĝis reaŭdo !

---

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch*
*Prilaboris: Stefano KELLER, decembro 2012*